

La 8an de majo 2016

Grandega damaĝo al la vivo en Kumamoto

Hodiaŭ estas la 8a de majo. Jam pli ol 3 semajnoj pasis post la komenciĝo de la tertremoj en Kumamoto, sed tertremoj ankoraŭ daŭras. Jen estas nombro de tertremoj ekde la 14a ĝis la 28a de aprilo:

Tertremoj de grado 7	2
Tertremoj de grado “forta 6”	2
Tertremoj de grado “malforta 6”	3
Tertremoj de grado “forta 5”	3
Tertremoj de grado “malforta 5”	7
Tertremoj de grado 4	80
Tertremoj de gradoj 1~3	929
Sumo	1026

*Kiam okazis tiu grandega tertremo en 2011, mi unuan fojon spertis tertremon de grado “forta 5” en mia urbo. Tio estis la plej forta tertremo, kiun mi spertis dum la pasintaj 70 jaroj. Eĉ tertremoj de grado 1~3 timigas nin, do kiel maltrankvilaj estas la loĝantoj de Kumamoto!

Jen estas damaĝoj ĝis la 2a de majo:

Damaĝoj al homoj	mortintoj	49
	Rilataj mortintoj*	17
	malaperinto	1
	rifuĝantoj	20020
Damaĝoj al domoj	Tute detruitaj aŭ duone detruitaj domoj	46630

*Rilataj mortintoj estas tiuj, kiuj mortis pro manko de sufiĉaj nutraĵoj kaj prizorgado aŭ pro malbonaj vivkondiĉoj. Multaj el ili mortis pro tiel nomata “ekonomiklasa sindromo”, dormante en aŭtomobilo, kiu kaŭzis sangoŝtopiĝon en la koro aŭ en la cerbo.

Damaĝoj al konstruaĵoj



Mi surpriziĝis, vidante en televido, ke multaj betonaj konstruaĵoj estis detruitaj. Multaj el ili estis konstruitaj laŭ la malnova normo antaŭ la Granda Tertremo de Hanŝin okazinta en januaro 1995. Poste la nova normo estis decidita, sed renovigi kaj plifortigi konstruaĵojn multe kostas, do ankoraŭ restas multaj konstruaĵoj ne sufiĉe fortaj. Ĉi-foje du grandegaj tertremoj sinsekve okazis, do tiuj ne povis toleri la tremojn.

Damaĝoj al domoj

Nun oni ekzamenas ĉiujn domojn por scii, kiagrade tiuj domoj estas danĝeraj. Laŭ la gubernio Kumamoto, el la 35000 domoj jam ekzamenitaj, 9994 estis juĝitaj kiel “danĝeraj” (estas danĝere eniri en la domon), 11437 kiel “atentendaj” (singarde eniri en la domon) kaj 14349 kiel “nuntempe sekuraj”. La nombro de detruitaj domoj estas duoble pli granda, ol tiu de la Tertremo de Ĉuuecu okazinta en 2004.



Laŭ enketo pri kialoj de rifuĝado inter 19000 rifuĝintoj,
69,5% timo al tertremoj
39,7% manko de vivkondiĉoj

33,3% domo estas ne loĝebla pro disĵetitaj mebloj

14,0% domo estas detruita aŭ difektita

Laŭ tiu enketo la gubernio konjektas, ke 2490 familioj bezonas novan domon.

Damaĝo al agrikulturo

La gubernio Kumamoto publikigis, ke agrikulturo de la gubernio suferos pro 76,7 miliardoj da enoj (767 milionoj da eŭroj) da damaĝoj. En la urbo Maŝiki, kie estis la epicentro de la tertremoj, troviĝas tie kaj ĉi tie difektitaj vojoj kaj kampoj. Ankaŭ fluiloj kaj akvorezervejoj estas difektitaj.



S-ro Nakagaŭa Aritomo, 69-jara, diras: “Ne venos akvo por kampoj, do mi ne povas planti rizplantojn. Mi ne povas deteni larmadon, pensante, ke ni ne povos vidi belajn rizkampojn tiun ĉi jaron”. Lia domo detruigis kaj nun li loĝas ĉe sia filino en la

urbo Kumamoto.

(Foto: faŭlto tranĉis kampojn)


Multaj brutoj mortis pro la tertremoj:

Bovinoj por lakto	150
Bovinoj por viando	600
Porkoj	550
Ĉevaloj por viando	10
Kokinoj	540000

La kastelo Kumamoto estas multe difektitaj

La kastelo Kumamoto estas simbolo de la urbo kaj fama turisma loko. Ĝi estis konstruita en 1607, sed en 1877 la ĉefa konstruaĵo kaj aliaj brulis. En 1960 ĝi estis rekonstruita. 13 konstruaĵoj en la kastela tereno estas registritaj kiel valoraj konstruaĵoj, sed ĉiuj difektiĝis. La ĉefa konstruaĵo kliniĝis, ĝiaj tegoloj falis kaj ĝiaj ŝtonaj muroj detruigis. La respondeculo de la kastelo diras: “Por ripari la tuton, oni bezonos pli ol 10 jarojn kaj

kelkdek miliardojn da enoj (kelkcent milionojn da eŭroj).



La ĉefa konstruaĵo de la kastelo Kumamoto

En televido mi vidis programeron pri riparado de ŝtona muro de alia kastelo. Oni fotis kvar flankojn de ĉiuj falintaj ŝtonoj kaj remetis ĉiujn ĝuste en la same loko kiel antaŭe. Nun en Kumamoto oni komencis kolekti monon por riparado, sed tiuj personaj donacoj estas gutetoj en maro, do nepre oni bezonas financon subtenon de la registaro, sed ĉu ĝi povos prepari tiom da mono?

Ĉu vere la nukleaj centraloj estas/os sekuraj?

Pro la tertremoj, tavolo sub la tero ŝanĝiĝis, do multaj timas eblan erupcion de la monto Aso. Vulkanologoj diras, ke nenormalaĵoj ne troviĝas en la monto, sed la tertremoj influis varmfontojn. En 9 hoteloj en la urbo Aso varma akvo ĉesis fonto. Tio estas grava afero por la hoteloj, ĉar japanaj turistoj tre ŝatas baniĝi en varma akvo el la fontoj.

Proksime de la tertremaj faŭltoj troviĝas du nukleaj centraloj. Unu el ili estas la centralo Sendai, kies du reaktoroj estas la solaj reaktoroj, kiuj nun funkcias en la tuta Japanio. Dum unu semajno post la tertremo 5000 petoj pri haltigo de tiuj reaktoroj atingis la elektran kompanion Kjuuŝuu, sed la prezidanto de la kompanio diris: “Nuklea energio estas necesa energio. Konstatante, ke la reaktoroj estas sekuraj, ni funkciigas ilin”.

La estro de Nuklea Reguligada Aŭtoritato s-ro Tanaka diris: “Proksime de la nuklea centralo Sendaj ne ekzistas aktiva faŭlto. La centralo estas sufiĉe forte konstruita kontraŭ tertremoj, do ni ne bezonas esti maltrankvilaj. Se okazos akcidento, la loĝantoj povos rifuĝi foren aŭ en fortajn konstruaĵojn. Ni neniam antaŭvidas, ke ĉiuj konstruaĵoj en la radiuso de 5~30 kilometroj estos detruitaj”.

Tamen oni tute ne antaŭvidis ĉi-fojajn tertremojn, do same oni ne povas antaŭvidi, ke fortegaj tertremoj okazos sub la centralo. Krome, se okazos grava akcidento en la centralo, la loĝantoj ne povos fuĝi laŭplane pro detruoj de domoj, ŝoseoj, pontoj, fervojoj, blokitaj stratoj kaj manko de benzino. Tion



bone atestas tiu ĉi tertremaro de Kumamoto. Elektraj kompanioj kaj la registaro neniam lernis lecionon el la akcidento de Fukuŝima kaj por ili homa vivo estas malpli valora ol profito.

(Foto: elreliĝinta rapida trajno)

Komence de majo estis multaj feriaj tagoj, kaj multaj homoj iris al Kumamoto por helpi rifuĝintojn. Mi povis fari nenion krom iom da monhelpo. Kumamoto estas tre for de mia hejmo, do mi nur spektadas televidon kun maltrankvilo kaj kompato.

HORI JASUO